

Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo)

エスペラントよこはまのエスペラント文会報

La Japanan Kongreson en 2017 ni invitas al Jokohamo

Ni, la Neprofitocela Organizo "Esperanto Jokohama" invitas la venontjaran 104-an Japanan Esperanto-Kongreson en nia urbo, kiel montras ties unua informilo. Je nia bedaŭro, ni ankoraŭ ne povas fiksi la kongresejon mem, sed ni ekpaŝis kiel jene. Ni en ĉi-jara 103-a Japana Kongreso en Oumihaĉiman ekvarbis membrojn, kaj je la Fermo, nia estrarano Nanba Fumiharu faris bonvenigan saluton.

(parto de la unua informilo)

La 104-a Japana Esperanto-Kongreso en Jokohamo

Dato : 3-a (ven.), 4-a (sab.), 5-a (dim.) de novembro 2017

Kongresejo : ankoraŭ ne fiksita

Kongresa temo : Haveno peras, Esperanto peras.

Ĉi tiu kongreso okazos en Jokohamo, granda havenurbo en la suda parto de la regiono Kantoo, meze de Japanio. Antaŭ pli ol 150 jaroj la haveno malfermiĝis al eksteraj landoj. Post tio, Jokohamo jam longe kreskis kiel internacia havenurbo. La haveno ne nur helpas internacian komercadon sed ankaŭ peras interkonatiĝon inter homoj de diversaj landoj.

Ni vidas komunan aferon inter haveno kaj Esperanto. Ili ambaŭ helpas internacian komunikadon kiel neŭtrala "peranto". Pro tio ni decidis, ke la kongresa temo estu "Haveno peras, Esperanto peras", por ke multaj esperantistoj havu ŝancon denove pensi pri Esperanto en la venonta kongreso.

Bonvenon al la havenurbo Jokohamo! Ni atendas vian partoprenon!

Pri detaloj havu kontakton kun Japana Esperanto-Instituto

/ JP-162-0042 Tōkyō-to Sinzyuku-ku Waseda-mati 12-3

retadreso: esperanto@jei.or.jp, telefono: +81-3-3203-4581, fakso: +81-3-3203-4582

retejo: <http://www.jei.or.jp/hp/esp.htm>

(Loka organizanto) Neprofitocela Organizo Esperanto Jokohama

retadreso: info@esperanto.yokohama

retejo: <http://www.esperanto.yokohama/>

104a Legokunsido

En la 10a de septembro, ni havis la 104an Legokunsidon por "Tri rakontoj pri la miljara paco" de John Francis. Partoprenis Mizro Iwaya, SIBAYAMA Noriko kaj Zyun'iti.

Konfuza enhavo

AIDA YAYOI

Mi ne klare kaptis kion la verkisto intencis skribi. Tio iritis min. La rilatoj inter personoj en la rakontoj ne estis facile kompreneblaj. Pli da zorgemo aranĝi simple la intrigon estis mia deziro por la verkisto.

Kiel sensenca fabelo tiu ĉi estas! Tia komenca impreso tamen iom post iom korektiĝis dum mia ripeta legado, sed la libro ankoraŭ restis ne en mia favorata speco. La malantaŭkovrilo klarigis, ke la verko apartenas al "fikcihistoria" ĝenro, parte (t.e. la tria parto) similas al la aventuro de "La vojaĝo de Gulivero" de Jonathan Swift, skota same kiel John Francis, tiu ĉi verkisto.

En la unua parto sub la tezo de militfilozofio, ke eterna paco ne plu ekzistas kiel sankta leĝo, la du landoj Juglando kaj Dalfunto kaŝe sendis spionojn unu la alian. La unikaj karakteroj de spionoj kaj tiuj humuraj epizodoj rompis longedaŭran paŭtadon inter malamikaj landoj kaj helpis starigi pacon. Vere interese ke "ne tre ortodoksaj" manieroj sed per friponoj efektiviĝis paco. Parenteze, mi ne komprenis vorton "paŭtadon", sed ektrovis ĝin senarmila milita stato, t.e. "nirami" japane.

La dua parto estas pri ludekzercoj aŭ alivorte, abstraktaj, senarmilaj konfliktoj faritaj de ĉefrolulo Hilver Areŝ kaj liaj subuloj. La ludekzercoj kiel lanco-konkursoj estis esprimataj vivece, detale, sensacie. Festa etoso stimulis kreskantan popularecon de la konkurso kaj ĝuigis spektantojn. Longa epoko de paco tedis homojn, sed konkreta milito estis malpermesita, kaj tial ili devis anstataŭigi ĝin per abstraktaj konfliktoj kiel lanco-konkursoj. Nuntempe ludekzercoj estas faritaj uzante la plej novajn armilojn. Por eviti realan militon ĉu la ludekzercoj estas absolutaj necesaj?

La tria parto estis pli facile komprenebla ol antaŭaj komplikaj du partoj, sed tamen personoj kaj aferoj embarasus legantojn pro diverseco. Se tiu ĉi rakonto koncentriĝus al

fremdulo kun sia ekzota historio, mi povus finlegi ĝin iom kontente. Bedaŭrinde la verkisto eniris en la kampon de konspiroj en la imperiestra familio, aŭ magia spektaklo aŭ esplorado de antikvaj tomboj k.t.p. Prave li fieras sian verkistan talenton.

Tri rakontoj pri la miljara paco

MIZRO IWAYA

Tiu ĉi libro estas el rakontoj antaŭirantaj de "Vitrilo". Mi renkontis malfacilon dum la legado, ĉar la historia disvolviĝo iras zigzage. Do mi klopodos analizi la malfacilecon laŭ la rakontoj.

1. La unua epizodo: La friponaj diplomatoj

Antaŭ ĉio, la aperintaj personoj estas tro multaj kaj ili ne ludas gravan rolon en la historio de tiu ĉi rakonto. Ekestis milita minaco inter du reĝlandoj, sed "friponaj diplomatoj" solvis tiun problemon kaj preventis militon. Ili aranĝis intervidiĝon de ambaŭ reĝoj kun komplika manovro per diversaj koncernatoj. Tie aperas multaj ministroj, diplomatoj kaj spionoj. Tial ni devas legi kun notpapero por klarigi la strukturon de la historio. Mi aldonas ke ankaŭ la aperinta teatraĵo ne estis familiara al mi.

2. La dua epizodo: La senpintaj lancoj

Ĉi tie aperas kelkaj konkursoj, kiuj anstataŭas efektivan militon, kun koncernaj atletoj kaj organizantoj. Ekzistas klarigoj de la konkursoj. Paralele okazas diversaj konfliktoj, precipe inter la mamonaj komercistoj kaj batalemaj idealistoj. Tia tendenco spegulas la realan mondon de Olimpiko kie marŝas paralele komercismo kaj sportismo. Oni povas diri refoje ke aperas tro multe da aferoj en la rakonto.

3. La tria epizodo: La stranga fremdulo

Kruzanta ŝipo trafis grandan trombon. Tie neatendite aperis stranga fremdulo kvazaŭ el alia mondo. Li renkontis intrigon de kronheredo en reĝa kortego. Aperas du epizodoj, la fremdulo kaj la frato de kronprinco, sed la

strukturo ne estas tiel komplika.

Fine mi volas diri ke al noveloj necesas ordigita disvolviĝo de la historio. Eksterordinara okazaĵo necesas esti en fikcio, jes, sed ĝi devas esti unu aŭ du, ne multaj. Ankaŭ en Japanio ekzistas tia ĝenro nomata fantazia romano. Tie eksternormaleco kaŭzas en mi ian embarason. Saman senton mi havis en tiu ĉi libro.

Neokazinta miljara paco kaj okazinta tricentjara paco

Sibayama Zyun'iti

Ĝenerale en Esperanto-literaturo, mi trovas kvalitajn verkojn en utopia (aŭ kontraŭ-utopia) ĝenro. Tiu ĉi novelaro, kvazaŭ historia de John Francis, estas fakte fantazio mez-utopia, mi nomas. Nome tie okazas konfliktoj, malicaĵoj, ĵaluzaĵoj, intrigoj, sed ne okazas amas-mortiga milito. La herooj kaj kontraŭherooj en la novelaro supozigas teritorion eŭropan, kaj tie miljara paco estas tenata – kio estas kontraŭ fakto en la vera Eŭropo. Sed legante, mi iel

supozis pri la japana t.n. Edo-epoko, de la komenco de la 17a jarcento ĝis la posta duono de la 19a jarcento, por malpli ol tricent jaroj. Tiam Japanion regis paco sub ŝoguna familio Tokugaŭa. Tiam okazis konfliktoj, malicaĵoj, ĵaluzaĵoj, intrigoj, sed ne okazis amas-mortiga milito.

En tiu japana periodo, "samurajo", t.e. militista klaso regis super agrokulturistoj, komercistoj ktp, sed ili efektive ne dishakis homkapon, kaj ili ekzercis sin en skerm-arto per bambuaj aŭ lignaj glavoj. Do la ideo pri "La senpintaj lancoj" (la 2a el la 3 rakontoj) por malakrigi militemon kaj redukti ĝin al ludemo, ŝajnas esti la tuta karikaturo de nia Edo-epoko.

En japanaj histori-fantaziaj romanoj, unu el la ŝatataj temoj estas, ke Macuo Baŝoo, hajkmajstro, migrinta de loko al loko, faris veran spionan agadon kontraŭ potenca nordorienta regiono japana. Estus interese supozi, kian intrigon faris Baŝoo, – mia libera ide-flugo de la rakonto "friponaj diplomattoj" (la 1a rakonto).

Eseoj

Pikaĉuo elektranta antaŭ la kongresejo!

Nanba Fumiharu


En la lasta somero, nova komputila ludo (saĝtelefona ludo) "Pokémon GO" eldoniĝis tutmonde. Post tiam multaj pokemonoj (Pokémon) aperas ĉe parkoj, stratoj, butikcentroj kaj aliaj publikaj ejoj. Kaj ĉasante ilin, multaj "trejnistoj" (pokemon-ludantoj) ankaŭ kuras de ĉi tie tien portante siajn saĝtelefonojn.

Pokemono estas tre famekonata serio de komputila ludo. En la ludo, diversaj "pokemonoj" (Poŝaj Monstroj) aperas, kaj "trejnistoj" ludas pokemonojn kaptante, kolektante, bataligante ktp. La nova "Pokémon GO" plivastigis tiun ludejon al la REALA MONDO, utiligante la teknologion de Google Map!

Ankaŭ en Nitro, ĉi-jara UK-urbo, jam multaj pokemonoj ekaperis. Kiam mi partoprenis en la UK, mi kelkfoje kaptis ilin ankaŭ en la kongresejo, kaj eĉ bataligis ilin antaŭ la

kongresejo.

Jen estas Pikaĉuo, la plej fama pokemono, batalanta antaŭ la aŭlo Lapenna (ĉefa enirejo kaj informejo de la kongreso). Verdire, ĉi tie troviĝas unu "Pokémon Gym" (areno de pokemonoj), pro tio mi metis mian Pikaĉuon kaj bataligis kun mia alia pokemono "Jigglypuff". Pikaĉuo bone pafis brilan elektron!



Gastiginte mian amikon el Bulgario

KOBAYASHI Madoka

De la 3a ĝis 12a de septembro, mi gastigis mian amikon Angel Ivanov Maglov. Ni konatiĝis en la 93a UK en Roterdamo 2008. Sekvintjare mi vizitis lin post la 94a UK, kaj restis tie en 1 semajno. Li kaj lia edzino Dimitrinka bone zorgis min kiel sian familianon.

En sia retletero li iam diris, "Viziti Japanion estas mia revo. Sed finance tio estas malfacila." Tamen en ĉi tiu printempo, li decidis viziti Japanion por revidi min kaj alian esperantiston kiu proponis gastigi lin. Finfine Angel realigis sian revon kaj vojaĝis longan vojon de Bulgario ĝis Japanio!

Antaŭ lia vizito, mi multe pensis pri la plano ĉar mi volis ke li estu kontenta dum sia restado. Mi volis gastigi lin kiel li faris, sed mi ne havis sufiĉe da kapablo de tempo kaj de Esperanto. Do mi pripensis peti helpon de "Esperanto Jokohama" kaj kontaktis s-inon Doi. Ŝi varme akceptis mian peton kaj proponis multe da helpoj. Tamen samtempe alia ideo alvenis, "Ĉu Angel estas feliĉa, se mi petos helpon de aliaj esperantistoj pri lia restado kvankam li vizitos min...?" Mi multe cerbumis kaj ne povis havi ideon kiel fari, ĝis mezo de aŭgusto. Kiam mi konsultis mian patrinon, ŝi diris "Fidu s-inon Doi, kaj parolu kion vi pripensas. Ŝi havas spertojn kaj kapablojn. Nuntempe akceptu helpojn, kaj redonu iam, tio estas bona." La vortoj malpezigis mian koron. Sed ankoraŭ necesis puŝo, kaj tio baldaŭ alvenis. La telefono de mia patro, "Mi demandis Sunjon kaj ŝi bonvenigos la vizitanton". Mi surpriziĝis kaj tuj telefonis al s-ino ITOU Teruko (Sunjo) kiu loĝas en la urbo Haĉiouĝi. Ŝi diris ke ŝi ĝoje gastigos Angel. Mi parolis mian heziton al ŝi. Ŝi respondis "Faru kion vi povas; tio estas bona kaj sufiĉa." La vortoj helpis min fiksi la planon.

<la tagoj de Angel en Japanio>

la 30a de aŭgusto ~ **la 2a** de septembro: resti ĉe alia esperantisto en Tokorozaŭa

la 3a: alveno al Jokohamo. Ni ĝojis nian revidon kaj li ĝuis vidi miajn infanojn Koutarou kaj Halu. Li partoprenis en la kunsido de "Esperanto Jokohama" kaj parolis pri Bulgario (bedaŭrinde mi ne povis aŭskulti lin ĉar

Koutarou volis ludi ekstere). Post la kunsido, ni havis bonvenigan kunsidon kun vespermanĝo. Li gastis ĉe ges-roj Doi en 3 tagoj.

la 4a: Kun s-ino Doi, ni vizitis vidindaĵojn ĉirkaŭ Kanazaŭa-bunko (Ŝomjoĝi, la Muzeo de Kanazaŭa-bunko, veturado de "seaside-linio" kaj Noĝima). Angel estas eksfervojisto; do li interesiĝis pri veturado per senŝofora trajno! Ni ĝuis vespermanĝon ĉe ges-roj Doi.

la 5a: turismo en Kamakura kun ges-roj Doi

la 6a: Li tranoktis ĉe mi dum 2 tagoj. Ni manĝis *okonomi-jaki* kaj promenis ĉirkaŭ mia loĝejo. *Tohu* plaĉis al li! Dum lia restado, mia edzo ne estis pro labora vojaĝo. Angel zorgis pri la infanoj kiam mi preparis manĝaĵon, laboris antaŭ komputilo, ktp.

la 7a: turismo al la centro de Jokohamo (la muzeo de trajnaj modeloj de Hara, veturado per ŝipeto (*seabus*), Ĉina kvartalo kaj Minato-nomieru-oka-Koen). 7 membroj de "Esperanto Jokohama" kunvenis! (s-ino Doi, Kajahara, Imai, Miyakawa, Moriĵa, Negiŝi kaj s-ro Fuse)

S-ino Kajahara gvidis tute. En la muzeo de trajnoj, Angel kaj s-ro Fuse kaj Koutarou havis sperton por konduki trajnon!

la 8a: Ni tagmanĝis kun miaj gepatroj kiuj loĝas en la urbo Kofu. Ni renkontiĝis ĉe la stacidomo de Haĉiouĝi kiu estas meze de ambaŭ loĝlokoj. Poste ni renkontis s-inon Sunjo, kaj Angel tranoktis 2 noktojn ĉe ŝi.

la 9a: turismo de Tokyo per HATO-buso.

la 10a: Ni kunlaboris por ekspedi la organojn de La Tamtamo. Li restis ĉe mi.

la 11a: Angel veturis per *ŝinkansen* pri kio li tre interesiĝis! Mia bopatrino ekhavis la ideon kaj mia bopatro kuniris. Ili vizitis Odaŭara-kastelon kaj manĝis eki-ben. Poste, ni havis adiaŭan vespermanĝon kun mia familio (bogepatroj, bofratino, ŝia amiko, kaj mia edzo).

la 12a: forflugo de la flughaveno de Haneda

Dum lia restado, varmegaj tagoj daŭris, sed li ĝuis ĉiutagajn spertojn kaj renkontojn kun agrablaj homoj. Dank' al multe da helpoj de esperantistoj kaj familianoj, mi povis gastigi mian amikon Angel!